

Johann Wolfgang von Goethe,  
 Dornrozeto  
*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vidis knab': Jen, juna flor'!  
 Rozujet' kampara!  
 Bela, kiel la aŭror'!  
 Li alkuris ĝoje por  
 Vidi, kiel kara!  
 Rozo, rozo, ruĝa roz',  
 Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,  
 Rozujet' kampara.  
 Diris roz': Mi boras vin,  
 Ĉiam vi memoras min,  
 Pro l' dolor' amara.  
 Rozo, rozo, ruĝa roz',  
 Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do  
 De l' rozuj' kampara,  
 Ĝi, defende, pikis tro!  
 Sed ne helpis ve kaj ho  
 Kontraŭ vol' barbara.  
 Rozo, rozo, ruĝa roz',  
 Rozujet' kampara.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocsa, \*1911 – †1976).*

*Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.*